# 10 jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy

La 20an de septembro 2008, do antaŭ 10 jaroj, estis solene inaŭgurita Esperanto-Muzeo en Svitavy. Omaĝe al tiu jubileo estis en la tagoj 14. - 16. 9. 2018 en Muzeo preparita solena festo kun akompana programo. Ĝi okazis sub aŭspicio de urbestro de Svitavy, sinjoro David Šimek, kiu partoprenis sabatan solenaĵon kun direktorino de Urba Muzeo kaj Galerio en Svitavy, sinjorino Blanka Čuhelová. Ekde vendredo festis kun ni gastoj el Slovakio, Hungario kaj Francio.



Ni rememorigu, ke la muzeo estiĝis danke al kunlaboro inter la urbo Svitavy, Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy, loka Klubo de amikoj de Esperanto kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ekeston de la muzeo grave finance subtenis Ministerio pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko, la urbo Svitavy, la fondaĵo Esperantic Studies Foundation, ESF (Usono) kaj ĈEA. La belega domo, en kiu la Muzeo situas, estas posedaĵo de la urbo, kiu estas prizorgata de la Urba Muzeo kaj Esperanto-Muzeo estas tie en senpaga luo. Ekde la jaro 2011 estas en ĝi ankaŭ sidejo de ĈEA. La buston de Zamenhof pruntas al ni la Urba Muzeo en Česká Třebová.

Nun iom el la programo. Vendrede estis solene inaŭgurita ekspozicio nomita "10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko".

La unua parto de la ekspozicio prezentas al ni eksterlandajn gastojn de la muzeo, pasintajn aranĝojn, eksponaĵojn de donacintoj de la Muzeo kaj ankaŭ nian prezentadon de la urbo Svitavy kaj de la Regiono Pardubice pere de Esperanto. La dua parto de la ekspozicio estas dediĉita al historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio en la jaroj 1918-1968. Poste kelkaj partoprenantoj (V. Kočvara, P. Polnický, L. Chaloupková) diris al ni siajn rememorojn el tiu tempo kaj Peter Baláž prelegis pri aktivecoj de E@I.



Sabate dum la solenaĵo, okazinta en la granda salono de la Ottendorfer-Domo, ni povis aŭdi salutvortojn de la urbestro de Svitavy, de la direktorino de Urba Muzeo kaj Galerio, de Peter Baláž nome de SKEF, László Szilvási nome de KEA, Lenka Angelová nome de AEH kaj ankaŭ salutvortojn el la mondo (Italio, Aŭstrio, Togo, Nederlando, Rumanio, Pollando, Brazilo, Belgio, Usono). Ni ricevis ankaŭ salutleteron de Blanka Skučková, estrino de la departamento pri bibliotekoj kaj literaturoj en la Ministerio

pri Kulturo. Petr Chrdle konatigis nin kun tempo antaŭ kaj dum ekesto de la Esperanto-Muzeo. Poste samideanino Libuše Dvořáková prezentis al ni dek jarojn en la muzeo rilate al ekesto, aranĝoj, gastoj kaj biblioteko kaj sinjorino Pavla Dvořáková prezentis al ni ekspoziciojn, inaŭgurojn kaj uzon de informaj teknologioj en la muzeo kaj sekve pianludis.



Poste ni revenis suben en la muzeon, kie atendis nin ne nur loka televido, sed ankaŭ torto kun kandeloj. Mi dankis al tiuj, kiuj prizorgas la muzeon, ĉar sen ili, speciale sen loka klubo, ne povus nia muzeo transvivi. Posttagmeze sekvis ekskurso al muzeo kaj kastelo en Moravská Třebová, vespere okazis koncerto de la muzikgrupo NOPROBLEM Kostelec na Hané kaj poste ĉeĥo-slovaka vespero kun amuza programo.



Dimanĉe laŭ la ideo de Viktor Dvořák okazis Muzea seminario, en kiu prelegis Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Vladimír Türk, Peter Baláž, Ján Vajs, László Szilvási kaj Mária Piľková. Ĉefaj temoj estis historio de niaj movadoj kaj ciferecigado, prilaborado kaj posta uzo de historiaj materialoj.



La festo okazis ne nur por festi dekjariĝon de la muzeo, sed ankaŭ por danki al ĉiuj, kiuj akiris meriton pri ekesto de Esperanto-Muzeo kaj kiuj ĝin subtenas kaj zorgas pri ĝi. Ni povis aŭdi multajn nomojn, sed certe ni dum tiuj tagoj ne parolis pri ĉiuj, do ankoraŭfoje mi dankas al ĉiuj, kiuj diversmaniere laboras por la muzeo kaj al iliaj familioj, sen kies subteno tio ne eblus.

*Libuše Hýblová*



*fotoj Pavla Dvořáková kaj Ján Vajs*